**Eŭropo: „usonanoj ene, rusoj ekstere kaj germanoj sube”**

verkita de *Éric Bernard COFFINET*
ebcoffinet.fr

La dudeka jarcento formiĝis PER nafto kaj POR nafto. Oni militis POR nafto, oni venkis PER nafto kaj malvenkis PRO nafto. Nafto fariĝis ia nigra sango traflue viviganta nian mondon kaj nepre necesa al ĝi por potencaj motoroj kaj organika kemio. Dum la tuta dudeka jarcento Usono havis du konstantajn zorgojn: kontroli nafton kaj malfortigi Rusion por daŭre superregi la mondon.

Sekve de la unua mondmilito (1914-1918) disfalis pluraj eŭropaj imperioj kaj Eŭropo perdis sian riĉecon kaj sian potencon. Sekve de la dua mondmilito (1939-1945) Eŭropo perdis sian aŭtonomecon kaj eĉ sian liberecon. Ambaŭfoje profitis Usono kaj la financaj potencoj brit-usonaj.

En 1917 eksplodis revolucio en Rusio. Eŭropaj landoj, Japanio kaj Usono batalis kun la kontraŭrevoluciaj rusoj „blankaj” kontraŭ la komunistaj rusoj „ruĝaj” (1). Japanio kaj Usono sendis trupojn al la ekstremorienta parto de Rusio por kontroli Siberion (2) .Sed finfine venkis la bolŝevistoj... Ekde tiam Usono kaj la financaj potencoj brit-usonaj konstante strebadis al malfortigo de Rusio por akapari ĝiajn naturajn riĉaĵojn kaj malebligi ĝian aliancon kun aliaj eŭropaj landoj.

Tiuj, kiuj vere oponis kaj venkis la naziismon, ne estas la brit-usonanoj sed ja la rusoj. Inter la du mondmilitoj brit-usonanoj pro timo de la komunismo favoris per mono kaj politiko la disvolviĝon de la naziismo (3), por ke Germanio fariĝu forta armilo kontraŭ Rusio. Multaj politikistoj kaj eminentuloj okcidentaj, eĉ la brita reĝo Eduardo la Oka (4), estis favoraj al Germanio de Hitlero. Usono influis, por ke Germanio ne pagu ĉiujn siajn monŝuldojn post la unua mondmilito kaj plifortigu siajn industriojn. Britio ne konsentis, ke Francio ekmilitu kontraŭ Germanio en 1936, kiam la germanaj armeoj reokupis la dekstran bordon de la riverego Rejno spite al la pactraktatoj de Versailles kaj Locarno (5). Britio kaj Francio rifuzis aliancon kun Rusio kontraŭ Germanio kaj sekve okazis pakto inter Stalino kaj Hitlero en 1939.

Usonaj firmaoj daŭre helpis militantan Germanion ĝis kiam Hitlero deklaris militon kontraŭ Usono je la 11a de decembro 1941. Sekve la usona registaro malpermesis helpon al malamika Germanio kaj vole-nevole helpis Rusion (fakte vendis aŭ luis al Rusio). Sed printempe de 1945 la ĉefo *Allen Dulles* de C.I.A. (Centra Informkolekta Agentejo de Usono) kaj germanaj militestroj sekrete kunvenis en Svislando por priparoli apartan pactraktaton inter Germanio kaj la brit-usonanoj, cele al pli forta daŭrigo de ĝia milito kontraŭ komunisma Rusio. Pri tiu sekreta operaco nomita *Sunrise* (sunleviĝo) (6) aludas en 1973 la fama sovetia spiona filmserio titolita „deksep momentoj de printempo”, kiu grave influis la decidon de Vladimiro Putino aniĝi al K.G.B. (Komitato pri Ŝtata Sekureco).

Usono ne daŭre persekutadis la naziistojn post la Nurenbergaj procesoj sed ja varbis kaj protektis eminentajn fakulojn, sciencistojn (7), militistojn kaj politikistojn germanajn por kontroli Eŭropon kaj lukti kontraŭ Rusio. Ekzemple, *Walter Hallstein* (8) estis komisiita de Hitlero en 1938 por jure plani „novan Eŭropon” sub kontrolo de Germanio. Poste li estis enoficiigita de Usono kiel la unua prezidanto de la Eŭropa Komisiono de 1958 ĝis 1967 por starigi „novan Eŭropon” sub kontrolo de Usono. Tiel la situacion en Eŭropo resumis lordo *Hastings Ismay,* kiu estis la unua ĝenerala sekretario de NATO (Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo) de 1952 ĝis 1957: „usonanoj ene, rusoj ekstere kaj germanoj sube” (9). Simile

laŭ la politologo pol-usona *Zbigniew Brzeziński* necesas „antaŭeviti koluzion kaj daŭrigi sekurecan dependecon inter la vasaloj, gardi la tributulojn obeemaj kaj protektataj, kaj malhelpi regrupiĝon de la barbaroj” (10).

Miĥaelo Gorbaĉevo konsentis la reunuiĝon de Germanio en 1990 kondiĉe ke NATO ne plu disvolviĝu orienten. Tion Usono promesis sed ne plenumis (11). Kiam disfalis USSR (Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj), Usono kaj la novliberalismaj potencoj okcidentaj kredis, ke ili finvenkis. Ili daŭre plenumis sian planon por dispecigi Rusion kaj prirabi ĝiajn riĉaĵojn. Tio eblis dank'al Boriso Jelcino, rusaj oligarkoj kaj mafianoj, kiuj portempe regis Rusion. En 2000 la rusa prezidento Putino proponis al la usona prezidento Klintono partoprenon de Rusio al NATO (12). Rifuzon li ricevis, ĉar tio ne kongruis kun celoj kaj planoj de Usono kaj de ĝiaj novliberalismaj potencoj financaj. Post plia disvastiĝo orienten Eŭropa Unio kaj NATO fine atingis la lastan barilon, Ukrainio, kiun Usono provis uzi kiel armilon kontraŭ Rusio ekde 2014. Tiam rebatis Rusio...

Kio rezultis el tiu konflikto? Jam kvincent mil mortintoj kun ankoraŭ pli da vunditoj, da kripligitoj kaj da rifuĝintoj. Tiom da orfoj, da vidvinoj kaj da elmigrintoj! Tiom da sango, da larmoj kaj da suferoj! Ukrainio estas tute detruita kaj elsuĉita, eble baldaŭ dispecigota de najbaraj Rusio, Pollando, Hungario kaj Rumanio... jam parte vendita de Volodimiro Zelenskijo al internaciaj firmaoj kiel *Monsanto* aŭ *BlackRock* (13). Malfortiĝas ne Rusio sed ja la tuta okcidenta Eŭropo ekonomie kaj tra la mondo pli kaj pli kreskas kolero kaj ribelo kontraŭ Usono kaj ĝiaj eŭropaj vasalŝtatoj.

Tamen ĉu iuj povos profiti de tiu situacio? Unue Usono, kiu sukcesis daŭre apartigi Eŭropon disde Rusio, tiel ke eŭropaj firmaoj industriaj, precipe germanaj, pripensas sian translokiĝon al Usono pro la kreskanta kosto de la energioj en Eŭropo (14). Probable kelkaj firmaoj kaj bankoj, kiuj produktas kaj vendas diversajn rimedojn por detrui kaj poste rekonstrui. Tiel Usono jam faris dum la du mondmilitoj kaj poste per la „helpo-plano” *Marshall* (15). Britio sukcesis repagi ĉiujn siajn monŝuldojn de la dua mondmilito al Usono kaj Kanado en 2006 (16) kaj tiujn de la unua mondmilito en 2015! (17). Bone memoru tiujn vortojn de *Henry Kissinger*: „malamiki kun Usono estas dangere sed amiki kun ĝi estas pereige*”.* (18)

**Jen kelkaj fontoj, plej parte en la franca lingvo sed ankaŭ en la angla)**:


(1) https://fr.wikipedia.org/wiki/Intervention_alliée_pendant_la_guerre_civile_russe

(2) https://fr.wikipedia.org/wiki/Intervention_en_Sibérie

(3) https://histoireetsociete.com/2020/09/08/la-reserve-federale-americaine-et-la-banque-dangleterre-ont-finance-lallemagne-nazie/

(4) https://fr.wikipedia.org/wiki/Dossiers_de_Marbourg

(5) https://www.lhistoire.fr/feuilleton-1936/le-jour-où-hitler-pouvait-être-arrêté

(6) https://en.wikipedia.org/wiki/Operation_Sunrise_(World_War_II)

(7) https://fr.wikipedia.org/wiki/Opération_Paperclip

(8) https://blogs.mediapart.fr/jean-dugenet/blog/250120/walter-hallstein-etait-un-nazi

(9) https://www.nationalreview.com/2017/07/nato-russians-out-americans-germans-down-updated-reversed/

(10) https://en.wikiquote.org/wiki/Zbigniew_Brzezinski

(11) https://nsarchive.gwu.edu/briefing-book/russia-programs/2017-12-12/nato-expansion-what-gorbachev-heard-western-leaders-early

(12) https://lanouvelletribune.info/2024/02/otan-poutine-revele-une-troublante-anecdote-concernant-bill-clinton/

(13) https://lecourrierdesstrateges.fr/2022/08/16/des-entreprises-americaines-se-sont-largement-appropriees-les-terres-agricoles-ukrainiennes/

(14) https://fr.linkedin.com/pulse/et-si-lindustrie-européenne-se-délocalisait-aux-états-unis-

(15) https://www.marianne.net/agora/lectures/avec-les-origines-du-plan-marshall-annie-lacroix-riz-deconstruit-le-mythe-de-laide-americaine

(16) https://www.ledevoir.com/monde/europe/126044/londres-a-enfin-paye-sa-dette-de-guerre

(17) https://www.lesechos.fr/2014/12/le-royaume-uni-rembourse-encore-sa-dette-de-la-guerre-14-18-314801

(18) https://en.wikiquote.org/wiki/Henry_Kissinger